

Hermann Löns,  
 Sur la Lujneburga erikejo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. Lujneburga erikejo,  
 Vi mirakle bela land'.  
 Tramigrante vin mi trovis  
 Multon ĉe la vojo-rand'.  
 Faleri, falera  
 Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,  
 Amatin', amatin';  
 Ĉar vi scias tion:ja.

2. Fratoj, ni tintigu niajn  
 Glasojn, ĉar la juna vin'  
 Netrinkite acidiĝos.  
 Do, ni nun eltrinku ĝin  
 Faleri, falera  
 Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,  
 Amatin', amatin';  
 Ĉar vi scias tion ja.

3. Kaj la hundoj, ili bojas,  
 La pafilo, knalas ĝi,  
 Ruĝojn cervojn volas ĉasi  
 En arbaro verda ni.  
 Faleri, falera  
 Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,  
 Amatin', amatin';  
 Ĉar vi scias tion ja.

4. Ho, vi rava belulino,  
 Bildo lakta-sanga vi,  
 Niajn korojn interŝanĝu  
 Ni, ĉar bonas tio ĉi.  
 Faleri, falera  
 Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,  
 Amatin', amatin';  
 Ĉar vi scias tion ja.

*Traduko de la Germana poemo "Auf der Lüneburger Heide" de HERMANN LÖNS (\*1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-624-1261 (2012-10-22 23:12:20)*

*Pri la aŭtoro vidu la retejojn [http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann\\_L%C3%B6ns](http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_L%C3%B6ns) kaj <http://www.loens-verband.de/>.*